N. N. 01,

Baldaŭ sopirata tag’

tradukita de Joachim Gießner

Baldaŭ sopirata tag’,
Nikola’ kun sia ag’.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola’.

Ŝuon mi pretigos ja,
Ĝin plenigos Nikola’.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola’.

Ofte nokte sonĝas mi,
Kion eble donos li.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola’.

Frue mi rigardos, ĉu
Estos io en la ŝu’.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola’.

Nikola’, mi dankas vin,
Ĉar vi tre ĝojigis min.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola’.
Nun jam venis Nikola’.

...

Traduko de la Germana poemo "Das Nikolauslied" de N. N. 01 en Esperanton de Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-93-1224 (2012-10-10 22:50:59)

Pri la tradukinto vidu la retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Giessner`*. Kolekto de kanto-tradukoj troviĝas en* `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html`*.*